

La eldono de la antaŭa Scienca Revuo n-ro 180 en aprilo (1-a kajero de la jarkolekto 2000) signas la finon de la laboro de s-ro Hauger kiel redaktanto de nia asocia organo. Sekvis, en majo 2000, la "Bibliografio de Scienca Revuo" (resumo de la publikigaĵoj 1988-1999), vere treege diligenta finverko liaflanka post 12-jara dediĉa laboro por ISAE. La estraro, asociaj membroj kaj fidelaj legantoj de Scienca Revuo dankas al homo, kiu dum laboremaj jaroj oferis tempon, paciencon kaj grandan parton de propra familia vivo por la prospero de nia asocio. Ni deziras al nia eksiginta Svislanda ĝenerala sekretario, kasisto kaj redaktanto, kiu tiom fervore plenumis samtempe tri gvidajn funkciojn kadre de ISAE, por lia estonta vivoperiodo sanon kaj plenan personan kontentecon.

Redaktado de Scienca Revuo nun estas en la manoj de nova estraro elektita por la 3-jara estrarperiodo 2000 ĝis 2002. La estiĝo de redakcia teamo laŭstatute regulita ankoraŭ ne realiĝis kaj la prezidanto plenumis la taskon de komposto de kajero n-ro 181. Estas avantaĝo, ke sur la vojo al plibonigo de enhava, formo kaj ekstera aspekto de nia asocia organo ne ĝenas diktatoreca redakcia skemo. Tial eblis, reiri al ĝis 1987 sur la sciencrevua kovropago aperinta eliposimbolo. Manuskriptoj estu estonte sub kontrolo de kune laborantaj specialistoj kaj denove aperos - krom la por Scienca Revuo bazaj Originalaj Artikoloj - la rubriko "Scienca Eĥo", jam lanĉita en SR n-ro 170. La reeĥado de sciindaĵoj el diversaj sciadkampoj ĉerpitaj el sciencaj ĵurnaloj kaj lokaj gazetoj trovis favoran kritikon ĉe multaj legantoj.

En tiu ĉi kajero prof. *Bociort* ree kontribuas per filozofaĵo: tiu, kiu legis la antaŭajn artikolojn de la aŭtoro scias, ke el la plumo de filozofo ĉiam fluas tiom multaj interesaj filozofiaj pensoj, ke la longa manuskripto devis esti redakte dividita en Parto I - Teorio por tiu ĉi kajero (kaj Parto II - Praktiko por sekvonta kajero). Kontraŭe, d-ro *Kavka* bone scias, ke sciencaj artikoloj ju pli mallongaj des pli ŝatataj estas ĉe redakcio: en kondensa formo li prezentas artikolon pri fonolitoj, la vulkanaj rokaĵoj kiuj estigas klaran, tintan sonon post batado per martelo. D-ro *de Wit* publikigas prelegon pri ĉiam aktuala biodiverseco kiel surtera vivoesenca kaj s-ro *Wellhöfer* kaj kunaŭtoro prezentas tute novan temon por Scienca Revuo: Afrikaj maskoj el vidpunkto de Eŭropa kolektanto. Terminologio estas speciale grava tasko por internacilingvaj sciencistoj kaj mi esperas, ke la detala raporto de d-ro *Simon* kaj kunaŭtoro stimulas ISAEanojn por simila aktiveco en la propra fako. Recenzo en Esperantlingva ĵurnalo ne rajtas temi pri iuj ajn nacilingva libro - sed '*senvorta* bildvortaro' ja ne estas 'nacilingva legaĵo' kaj tial legitimas recenzi. Mi deziras distran legadon! *R. Sachs*

Pri la estetika kriteriologio de la beletro*

Parto I - Teorio

Ignat F. BOCIORT

Enkonduko

Antaŭ kelkaj jaroj oni demandis francan poeton pri nekomprenebla fenomeno: "Francio estas tradicie la patrujo de la beletraĵoj. Kial nuntempe okazas, ke volumoj de poeziaĵoj ofte restas nevenditaj, kvankam ili aperis en malgranda kvanto?" La respondo estis: "Se vi volas aĉeti pentraĵon, vi rigardas la bildon kaj tuj rimarkas, ĉu ĝi estas plaĉa aŭ ne. Sed pri la aĉetota libro vi legas artikolon de kritikisto kaj poste konstatas, ke la laŭdata libro al vi ne plaĉas. Post kelkaj similaj spertoj, vi ne plu aĉetas poeziaĵojn. Eble vi ekscias pri '*best seller*'-romano, sed vi poste rimarkas ke ne temas pri majstroverko, temas nur pri reklamo - ofte eksterestetike fondita".

Neniam en la kulturhistorio aperis tiom da beletraĵoj kiel en la nuna epoko. Tamen, kiom da *majstroverkoj* aperis en nia jarcento? Eĉ kun la prijuĝoj de la komitato por Nobelpremioj ne ĉiuj fakuloj konsentas. Partoprenantoj en diversaj belartaj konkursoj kutime ne vidas la kriteriojn laŭ kiuj iuj konkursaĵoj estis premiitaj kaj aliaj ne. Ĉu la respondoj, kiujn oni donas per enketiloj, baziĝas sur reala taksado de ĉiuj verkoj? Ĉie mankas la certeco pri la reala valoro de la beletro.

Aliflanke oni multe laŭdas la tielnomatajn "senmortajn" majstroverkojn - la epopeojn de Homero, Vergilio, Danto kaj aliaj, sed jam la "eterneco" estas filozofie dubinda epiteto, ĉar la naturo havas neniun funkcion por senmortaj fenomenoj. Kaj due, laŭ fidindaj statistikoj, tiuj "eternaj verkoj" estas multe pli laŭdataj ol legataj.

* *Sinteza metodologia starpunkto de la aŭtoro*

Necerteco de la legantoj

Antaŭ multaj nuntempaj verkoj (poeziaĵoj, teatraĵoj, romanoj ktp.) la legantoj sentas sin konfuzitaj. Ĉu la verko estas valora? Ĉu senvalora? Se la verko ne plaĉas al mi, eble mi estas konservativa, ekster mia apoko? Ĉu mi ne estas simpla snobo, se mi deklaras plaĉa verkon neplaĉan? Se iu atendas kelkajn kriteriojn por certe prijuĝi ĉiujn verkojn, li restos seniluziita, ĉar la problemoj estas tre kompleksa. Ne nur por la ordinaraj legantoj, sed ankaŭ por la literaturkritikistoj.

La hodiaŭa leganto orientiĝas laŭ personaj inspiroj kaj laŭ hazardaj informoj, aprecante kelkfoje malnovajn popolajn folklorajn (1), aliffoje novajn produktojn. La gamo estas vasta kaj tiu ĉi fenomeno akceptinda, ĉar ĝi spegulas la nepran liberecon en la universo de beletra. La dogmatikuloj emas paroli pri 'anarkio' en la arto, ili dezirus havi ĝin por siaj propraj celoj. Tamen, la beletra bezonas diversecon kaj normalan konkuradon pro gravaj kialoj: ĝi estas por ni signifoplena eksperimento sur abstrakta modelo de nia konscienco, kaj en tiu ĉi modeligo ni havas tre grandan intereson, ke ĉiu talento floru kaj ĉiu ideo spertu ŝancon manifestiĝi, pruvigi kaj disvolvi siajn potencialojn.

En tiu ĉi kompleksa fenomeno ne eblas prezenti aspektojn validajn por la tuta praktika sperto de historio. Tial mi tuj mencias ke miaj konsideroj limiĝas al perspektivo kiun mi taksas necesa por la nuntempa spirite sana homaro, inkluzive por la Esperanto-movado. Tiu perspektivo proksimas al la tradicio de klasikuloj de diversaj literaturoj kaj de nia esperantlingva literaturo. La proksimeco klariĝas per la fakto ke la grandaj spiritoj ĉiamaj (kaj la niaj) flegis idealojn, kaj sekve de tio ili havis altajn pretendojn de beletraĵoj.

La luktema beletra emis al "realismo", ĉar per tiu oni pli rekte kaj alir-eble alparolas homojn. Ĉiokaze la volumo *ESPERANTA ANTOLOGIO* (2) donas tiun konvinkon, kiun la rezulto de diversaj belartaj konkursoj (de UEA, de Literatura Foiro k. a.) ne neas, kvankam, kompreneble, ankaŭ la romantikismaj, simbolismaj kaj aliaj beletraĵaj spertoj povas efiki por niaj celoj. Evidentas ke ni ne postulas iun aŭ alian unikan artan tipon, sed tamen limigas niajn konsiderojn al aparta orientiĝo, kiun konkretaj ekzemploj povas ĉiam pravigi. La praktiko ĉiam multe pli diversas ol ĉiu teorio. Sed neniu teorio estus ebla, se ĝi volus enteni ĉiujn konkretajn kazojn kaj taŭgi 'por ĉio' (3).

La graveco de la problemoj

La teorio pri la kriterioj por taksado de beletraĵoj estas esenca ĉapitro de la literatura estetiko. Tamen ĝi estas plena de nesolvitaj problemoj kaj kontraŭdiraj respondoj. La Internacia Kongreso pri Estetiko (*Bucuresti* 1972)

donis al kriteriologio apartan sekcion, sed la scioj pri la afero ne faris noteblajn progresojn. Ankaŭ la antaŭa bibliografio pri la problemoj ampleksas (4).

Nia temo havas do unue teorian gravecon por la beletra kaj por la ĝenerala estetiko, por la teorio de la literaturkritiko kaj la literaturhistorio, same por la teorio pri la kreado de beletraĵoj kaj por la estetika instruoteco de la legantoj, precipe de la junularo en diversgradaj lernejoj. Sed ĉiuj supre menciitaj agadoj estas - kutime spontana - bazo por praktikaj aktivadoj.

Laŭ kiuj kriterioj aŭ almenaŭ principoj orientiĝas la beletra praktiko en la kreado kaj aprecio de la beletraĵoj? Ĉu eblas argumenti niajn taksadojn, aŭ ĉu ĉio restas al la kaprico de individuaj gustoj? Ĉu oni devas neglekti la personajn estetikajn rilatojn al la verkoj kaj akcepti vagajn, abstraktajn ĝeneralajn sencivajn? Alivorte, nia temo havas ankaŭ praktikan gravecon. Por respondi tiujn ŝarĝojn - almenaŭ en limigita sfero - necesas montri kelkajn teoriajn erarojn ĉirkaŭantajn la problemaron kaj fari praktikan provon de analiza legado cele konsciigi la vojojn - kaj la malfacilaĵojn - al la estetikaj valoroj de beletraĵoj.

Konfuzoj en la teorio

Se ni demandas fakulojn pri beletra laŭ kiuj kriterioj estas taksendaj la beletraĵoj, ĉu ekzistas 'kriterioj' en la beletra kaj en la arto ĝenerale, ni ricevas diversajn kontraŭdirajn respondojn:

1.) Tiaj kriterioj, oni respondas, ne ekzistas kaj ne povas ekzisti, ĉar kriteriojn oni aplikas al klaso, al kategorio de fenomenoj, dum la artverko estas 'unikajo' (5). Pretendi kriteriojn - oni diras - egalas kvazaŭ meti ĉiujn verkojn sur la liton de la antikva monstra rabisto Prokusto, kiu perforte alĝustigis siajn viktimojn al sia fera lito. Alivorte, kriterio kondukus al altrudita ĝenerala skemo.

Tamen, ni respondas, oni bone konscias, ke ĉiu homa kreaĵo estas taksenda por ke oni konstatu kiugrade ĝi respondas al siaj specifaj celoj. La socio konas nenian escepton de tio, kaj la psikologio de la arta kreado neniam povus pravigi tiuspecan escepton. Ni intuicie rimarkas, ke ĉio nin ĉirkaŭanta - sano, virto, eleganteco, bonkoreco ktp. - povas esti de alta aŭ de malalta grado. Labori kaj krei sen kriterioj por aprecio de la valoro de la rezulto estus senracia sinteno de homo al sia laboro. Same intuicie ni rimarkas, ke ankaŭ beletraĵoj povas havi tre altan gradon de perfekteco aŭ nur sufiĉan majstrecon. Sen objektivaj kriterioj por taksado la artverkojn, la beletra estus granda depono, konfuza kaj neutiligebla. La ĉefverkoj kaj la kiĉoj estus nedistingeblaj, oni ne povus hierarkiigi la verkojn kaj la verkis-

tojn, la estetika progreso estus nekonstatebla. Ni devus do fakte dedukti, ke ne eblas sciencaj kritiko kaj literaturhistorio.

2.) La dua ebla respondo de la fakuloj al la menciita demando povas esti: Certe, kriterioj por aprecadi la beletraĵojn ekzistas, sed tiuj ne kuŝas ekster la verko: ili ne apartenas al la socio, ĉar ili estas 'internaj kriterioj', specifaj por ĉiu verko.

Ankaŭ tiu respondo estas neakceptebla. Ĉu ekzistas 'internaj, por ĉiu art-verko specifaj kriterioj'? Tio estas nur elturniĝo, spekulativa artifiko: ĉiu ajn taksado kaj hierarkiigo apartenas al teorio pri klasado, kaj ĉiu ajn klasado aplikiĝas al kategorio aŭ grupo de samtipaj objektoj (kompreneble, samtipaj ne signifas identaj). La klasado postulas kriteriojn, kiuj aplikiĝas al la tuta klaso de fenomenoj individuaj, ĉiu fenomeno devas esti entenata en la sistemo de kriterioj unufoje kaj en sia tuteco.

Tio estas ankaŭ la kazo de la beletra aprecado. Se ni diras: "La verko *Anna Karenina* de *Lev Tolstoj* profunde penetras en la homan psikologion", ni taksas tiun verkon laŭ la kriterio "kapableco penetri la homan psikologion", kaj tiu ĉi kriterio apartenas al la socio, estas aplikebla al pluraj verkoj kaj verkistoj por konstati, kiugrade ili respondas al la postulo "penetri en la homan psikologion". Do, tiu kriterio, same kiel ĉiuj aliaj, ne estas specifa al unuopa verko. Tamen, la ideo de "internaj kriterioj" naskiĝis ne tute senbaze, ĉar, kiel ni vidas en la dua parto de tiu ĉi artikolo, aprecante verkojn ni devas ekiri de la verkoj mem, de ties komponantoj, solvoj, celoj, do "specifajoj", kaj ne de abstraktaj, universalaj kaj eternaj postuloj. La eraro komenciĝas en la momento kiam ni vidas nur la verkon kaj ne la horizonton de niaj postuloj. Fakte, ekirante de la verko mem ni samtempe havas en la menso pli aŭ malpli grandan beletran horizonton, el kiu ni tuj prenas kriteriojn adekvatajn por taksii la konkretan verkon. Imagu objekton kies tipo estas absolute nekonata, neniam antaŭe vidata. Laŭ kiaj "internaj kriterioj" oni povus taksii ĝin?

3.) La tria ebla respondo de fakuloj: La literaturkritikisto vere aplikas kriteriojn, sed tiujn kreas li mem, lia kulturita konscienco. Nek la historio nek la socio havas kriteriojn, nur la kritikisto kreas ilin laŭ neceso. Tiun starpunkton esprimis, ekzemple, la granda franca kritikisto *A. Thibaudet* (1874-1936). Temas pri teorio elitisma (la kulturita kritikisto situas super la socio) kaj impresionisma (oni vidas nur la subjektivajn opiniojn kaj impresojn de la kritikisto). Oni perdas el la konsidero *la sociajn funkciojn de la literatura kritiko: ĝi devas liveri al la socio informojn pri la reala valoro de la verkoj.*

Certe, la kritikisto aplikas al la verko siajn proprajn mondkoncepton, vidpunktojn, proprajn "kriteriojn", sed tiujn ne kreas li mem, ili estis prentaj ne el la propra fantazio sed el la historia beletra sperto. *Thibaudet* pov-

intus citi nek unu solan kriterion, kiu ne estus reala aŭ ebla ĉe pluraj kritikistoj. Bedaŭrinde, la tezo de *Thibaudet* invitis la kritikistojn esti nur "originalaj" - sed ne serĉante sian absolutan originalecon la kritikisto estas al sia socia celo: la socio postulas veraĵojn, ne ekstravagancojn. Ĉiu ajn aprecanto, en ĉiu ajn homa agadsfero, estas nur pli aŭ malpli kvalifikita parto de la publika konscio, reprezentanto de la sistemo P kadre de la sistemo A(Artisto) - V(Verko) - P(Publiko). La valoro de ĉiu ajn kritikisto konsistas ne en la kuriozeco de liaj "neantaŭvidataj" opinioj aŭ kriterioj, sed en la racieco kaj valideco de liaj konsideroj, plurdiscipline argumentitaj (t.e. psikologie, estetike, lingvistike, filozofie, sociologie ktp.) ĉar la *estetika valoro estas sinergia (6) efiko de la beletraĵ partaj kvalitoj sur la konscienco de la leganto.*

4.) La kvara ebla respondo de la fakuloj al la supre menciita demando estas: Jes, ekzistas kriterioj, sed ili estas aposterioraj, ne aprioraj, oni do povas vidi ilin nur post ke la literaturaj sciencoj (kritiko, literaturhistorio, literaturteorio ktp) analizis kaj taksis la verkojn. Nu, bonvolu legi ĉiujn tiajn analizojn kaj vi trovos (krom priskriboj de la verkista personeco), sennombrajn kriteriojn laŭ kiuj oni taksas la verkojn. Tiu ampleksa legado kondukas nin al grava kaj vera rezulto: ekzistas ne kelkaj kriterioj (laŭ la koncepto de la dogmatikuloj), sed ekzistas N (= nedefinita nombro) da kriterioj! Konsiderante ilin atente, ni konstatas ke ili grupiĝas laŭ diversaj disciplinoj, kies postuloj, pritraktoj kaj celoj necesas por kompreni la sinergian valoron de la tuto.

La granda valoro de la *Poetiko* de Aristotelo konsistas ne en ĝia antikveco, sed en ĝia metodologia signifo: la plej granda filozofo de la antikva Grekujo ne spekulis pri la teatraĵoj, sed eksplikis psikologie, sociologie, lingvistike kaj logike la pozitivan aŭ negativan efi-kon de la teatraĵo sur la publikon, do li pritraktis "plurdiscipline" la verkon, analizis kaj taksis ĝin laŭ ties postuloj. Do, la kriterioj estas imanentaj al la beletra, ne aprioraj aŭ aposterioraj rilate al aprecota verko.

5.) La kvina ebla respondo: Jes, kriterioj ekzistas. Ili estas tiuj, kiujn donas al ni la majstroverkoj de la pasinteco. Tiu respondo estas parte valida, parte nevalida. Vere, la majstroverkoj, naskitaj antaŭ multaj jarcentoj kaj konservitaj kiel grandaj spiritaj valoroj, taŭgas por formi sanajn gustojn de la nuntempuloj kaj por sugesti al verkistoj sukcesigajn beletrajn solvojn. Sed la kriterioj de ĉiuj ajn majstroverkoj estas nur primeditendaj, ne nepre aplikendaj, alikaze la novaj verkoj estus nur kopioj de la malnovaj. Tio estus morto de la beletraĵo kaj absurda sinteno al la malnovaj valoroj.

Novaj majstroverkoj, en ĉiu ajn socia sfero, estas samtempe "malnovaj" kaj "novaj", ili utiligas la malnovajn atingajojn por krei pli altajn valorojn, do ili dialektike unuigas la kontinuecon kaj la nekontinuecon. Blinda apli-

ko de malnovaj vojoj, eĉ de la plej sukcesaj, estas epigonismo, aleksandrinismo.

Plue ni devas konstati ke "majstroverko de la pasinteco" tute ne estas unusenca koncepto. La epopeo *Eneido* de Vergilio estis dum la kulturhistorio ofte aŭ akceptita aŭ malakceptita kiel majstroverko. La teatraĵoj de Ŝekspiro estis "fuŝaj", "suprajaj", "vulgaraj" por la klasikuloj de la 17a kaj 18a jarcentoj. Oni same povas konstati, ke multaj iamaj majstroverkoj dum certaj epokoj malaperis poste el tiu nobla kategorio kaj restis por ĉiam banalaj.

Konklude oni povas diri, ke la sciencoj de la literaturo donus grandan helpon al la nuntempaj verkistoj kaj legantoj montrante la verajn, la vivajn, ankoraŭ aktualajn valorojn de malnovaj verkoj (kaj ne nur de la majstroverkoj, ĉar ofte modestaj rakontoj, teatraĵoj ktp entenas elstarajn solvojn de la beletra strukturo).

6.) Kelkfoje, precipe en la moderna epoko, oni asertas ke la sola kriterio en la aprecado de beletraĵo estas *la novo, kiun ĝi alportas*. Ekzistas eĉ diletanta, amatora, senrigora teorio kiu asertas ke verkisto estas "tiu, kiu faras aliel ol li trovis". Temas pri tute naiva, nefilozofia koncepto, ĉar la novo en si mem ne estas valoro, se oni konsideras nur la "neantaŭvidaĵojn". Ĉiuj monstroj estas "aliaj" ol la antaŭaj.

Korekta, logika respondo rilate la novon estus tiele formulebla: ĉiuj verkoj havas abstraktan, internan modelon de la strukturo; la epigo-noj ne povas plibonigi tiun modelon, sed la kreantoj - jes. Do, temas ne pri iu ajn novo, sed pri la novo en la evoluigo de la abstrakta modelo de la beletro. La demando ne estas ĉu la nova verko alportas "ion novan", sed ĉu la novaĵo superas aŭ ne superas la jam ekzistantan. De jarmiloj la homaro utiligas veturilojn kun du, kvar, ses, ok radoj simetrie aranĝitaj, sed iu inĝeniero povus havi la ideon krei "novan" veturilon kun naŭ radoj anarkie aranĝitaj. Tiu komparo venas iufoje en nian menson rigardante teatraĵojn aŭ legante beletraĵojn. La novo validas nur en rilato kun la valoro, kun la kapablo de la koncerna sistemo funkcii supere.

7.) Iom pli komplika estas respondo kiun donas ne nur la ĝenerala publiko, sed ankaŭ multaj teoriuloj, kiuj kredas simpligi la problemon per la aserto: oni taksas la beletraĵojn laŭ la kriterio de la belo. Sed kio estas la belo? Ĉu ĝi estas unusenca koncepto, kiun oni povus uzi por klasi, hierarkiigi la verkojn kaj verkistojn?

Aŭdiĝas pli aŭ malpli serioze akceptita aserto: bela estas tio kio plaĉas al mi, kaj "pri la gustoj oni ne diskutu". Nu, sur la individua nivelo, la individua gusto povas esti individua afero, sed, sur la socia nivelo, la kapricoj kaj ekstravagancoj de la individuaj gustoj, opinioj, konceptoj ktp estas ofte tre danĝeraj, tial la leĝoj limigas la anarkion, permesas la voloĵojn, dezirojn

de la individuo nur ĝis certa punkto. En estetiko, feliĉe ni havas pli grandan liberecon, kaj tio tre gravas ne ĉar la beletro estus en si mem abstrakta sfero de absoluta libereco (kiel kredis romantikistoj), sed pro multe pli alta principo: nome ĉar la beletro estas por ni eksperimento sur abstrakta modelo de nia konscienco, prezentas ĉiujn ties aventurojn kaj plifortigas ties funkciojn. La beletro vidas multe pli profunde ol la ordinara okulo.

Certe, oni aprecas la beletraĵojn laŭ la kriterio "ĉu ĝi plaĉas al mi aŭ ne". Principe tio estas akceptebla sinteno, ĉar la arto devas plaĉi. Kio ne plaĉas "ne estas arto". Sed jam la ĉiutaga vivo montras, ke tio, kio "plaĉas al mi" en certa momento povas evidentiĝi kiel tragedio pli poste. La eldiraĵo "bela tio, kio al mi plaĉas" okazigas konflikton inter generacioj, ekz. kiam temas pri elekto de partnero por la vivo.

Fakte tiu eldiraĵo havas veran kaj malveran partojn. La vera parto konsistas en tio, ke *la belo havas ankaŭ subjektivajn komponantojn, ne nur objektivajn ecojn*. Tial ĉiu valoro estas rilato inter la konscienco de la aprecanto kaj la objektivaj ecoj de la aprecata objekto. Do, kion la konscienco ne akceptas, tio por ĝi ne rolas kiel valoro.

La malvera parto de la menciita eldiraĵo konsistas el la frazo "ne estas bela tio, kio estas bela" - aserto en si mem kontraŭdira kaj, tio gravas, neanta la objektecon de la belo, ties valorajn kvalitojn. Malaperus ĉiuj objektivaj valoroj de la socio, se tiu kontraŭdira aserto validus.

Konklude, la aprecanto devas konscii pri la risko erari en siaj gustoj. Li devas eduki kaj kontroli ilin, ĉar la aserto "tio al mi plaĉas, tial tion mi volas" ne distingas la asertanton disde la infano, kiu aprecas nur kolorajn bildetojn, volas manĝi nur dolĉaĵojn anstataŭ la salubraj lakto, fruktoj kaj legomoj. Ankaŭ la drinkulo postulus nur alkoholaĵojn. Do, "kio al mi plaĉas" tute ne estas sendiskuta kriterio.

Bedaŭrinde multaj aŭtoroj nuntempaj ofertas nur "alkoholaĵojn", ĉar primitivaj konsciencoj de nia epoko ŝatas kaj aĉetas ilin - sed tiele la arto iĝas ĉiesulino. La granda, malfacila ŝarĝo de la beletro restas la malnova postulo de Horacio: ĝi devas esti kaj "dolĉa" kaj "utila" (racia, sencoplana).

Kutime oni ankaŭ ne konscias ke la "plaĉo" mem ne estas nur unueca sed samtempe pluraspekta impresio. Ĉiutaga leganto konscias pri tio nur kiam oni petas de li diri, kial al li plaĉis iu spektaklo. Tiam li eble respondas: "Plaĉis al mi la centra persono, la graveco de la ideoj, la bela lingvo".

Tia respondo havas metodologian signifon: por konsciiĝi pri la valoro de iu kreaĵo, ni devas malkomponi ĝin en la subsistemojn kaj apreci ĉiun komponanton aparte, ĉar nia intuicio ne sufiĉas por vere taksati la valorojn. Ĉu la juriistoj de beleckonkursoj ne donas "notojn" al diversaj "komponentoj" de la belaj fraŭlinoj?

Ne necesas komenti plurajn respondojn al nia demando. Oni jam vidas, ke la respondoj estas kontraŭdiraj: ili entenas aŭ nur partajn veraĵojn aŭ estas entute eraraj. Kiam homoj de la diversaj sociaj tavoloj - inkluzive fakuloj - havas pri la sama fenomeno opiniojn ne nur diversajn sed eĉ kontraŭdirajn, tio signifas, ke la vero estas serĉenda per aliaj vojoj.

Plua elpaŝo por konsciigi la teoriantan aspekton de la problemoj

Por iom pli rigore pritrakti nian problemon necesas novaj heŭristikaj (7) principoj, bazitaj sur tezoj validaj por pluraj vivosferoj, kaj inspiritaj el sciencaj (biologiaj, fizikaj) akiraĵoj. Temas pri interdisciplina (8) aŭ plurdisciplina perspektivo, kiu kapablas kontroli, korekti kaj pliprofundigi la tradician estetikan pritraktadon.

La tradiciaj konsideroj en la beletraj sciencoj baziĝis sur pure intuiciaj metodoj. La intuicio, kvankam grava, estas tute neperfekta konilo. Ĝi estis programita nur por simplaj procezoj kaj fenomenoj, sufiĉe grandaj aŭ malgrandaj, sufiĉe rapidaj aŭ malrapidaj. Per ĝi ni povas vidi montojn, valojn, homojn, birdojn - sed nek la mikroskopajn vivestaĵojn nek la evolucio de la specioj nek la astronomiajn distancojn.

Ĉu ni vere povas intuicie tuj percepti la beletran fenomenon? La sistemoj invitas nin, malkomponi la pritraktendajn sistemojn por konsciigi pri ties komplekseco. Tiun analizan momenton la tradicia estetiko ne akceptis - ekzemple *Benedetto Croce* (9) - ĉar oni erare diris "malkomponente la verkon ni ne plu havas antaŭ ni beletraĵon, sed nur kadavron sur la medicina tablo". Sed tio signifas absolutigon de la analiza momento, kiu devas esti nur momento de la necesa sintezo. Kompreneble, malkomponita ne kapablas funkcii ne nur la beletraĵo, sed ankaŭ teknika aparato, same kiel la homa korpo ne povas funkcii malkomponata, sed sen tiu momento oni ne vere penetras en la funkcikapablan strukturon de la objektoj.

Nur malkomponente la beletraĵon ni povas rimarki ties kompleksecon, ĉar ĝi entenas kaj la objektivan mondon kaj la subjektivan konsciencan (ontologie ankaŭ ĝi estas objektivaĵo), do la verkoj entenas fenomenojn realajn kaj nereajajn, fantaziajn, eblajn aŭ neniam eblajn, dezirojn, sopirojn, idealojn, ĝustajn aŭ falsajn; tiaj elementoj estas relative facile videblaj.

Sed samtempe la beletraĵoj entenas fenomenon malfacile percepteblan, nome la informon. Ili entenas almenaŭ tri tipojn de informo, nome a) semantikan informon, b) ektosemantikan informon kaj c) strukturan informon. Por klarigi tiujn ĉi konceptojn, oni rigardu telefonaparaton. Tio, kion mi diras per ĝi al konatulo estas semantika informo. Sed eĉ nur rigardante la telefonaparaton, ĝi donas al mi informon: nome pri la formo, grandeco, koloro, moderneco de la aparato; do, temas pri informo transdonita sen-

intence. Se ni rigardas pasanton sur la strato ni tuj ricevas pri li informon, sen iu ajn vorto lia, nome ni rimarkas ĉu li estas juna, sana, granda, bone vestita ktp. Tio do estas ektosemantika informo. Sed la telefonaparato entenas ankaŭ alian informotipon, nome la informon pri tio, kiel ĝi estis konstruita, kiel oni faras aparatojn kapablajn funkcii telefone. Tiun ĉi informon posedas la konstruistaj inĝenieroj, kiuj scias uzi mikrofonon, aŭdilon, komunikigan elektran fluan k.t.p. Tiu informo pri la funkcikapabla strukturo de iu homa kreaĵo estas struktura informo.

La tritipan informon oni trovas ankaŭ en la beletra verko ĉar, unue, ĝi diras al ni ion, kio interesas niajn intelekton, emociion, volon; due, ni legas ĝin ankaŭ "tra la vicoj" kaj rimarkas faktojn, kiujn la aŭtoro mem ne nepre intencis transdoni al la legantoj: ĉu la aŭtoro estas moderna aŭ malnova pensulo, ĉu li estas progresema aŭ reakcia, kredanta je Dio ktp.; kaj trie, la verko entenas informon strukturan, do pri tio, kiel oni faras beletraĵojn kapablajn estetike efiki. Precipe tiun strukturan informon serĉas la estetikistoj, ĉar ĝi ege utilas al la verkistoj. La *Poetiko* de Aristotelo komenciĝas ĝuste per ĉi-rilate tre signifaj vortoj: li anoncas la intencon paroli pri la poezio ĝenerale, pri ĝiaj formoj kaj specifeco (do li malkomponas la sistemon) kaj pri la maniero krei imagon kapablan fari ke la komponaĵo realigu sian ŝarĝon: plaĉi, do, "esti bela".

Kompreneble, neniu leganto - eĉ la plej kvalifikita - sukcesas kapti la tutan informon entenan en beletraĵo. Ni ĉiuj kaptas nur parte la estetikan informon, respektive la valoron de la verko, kaj tiu "parto" tute ne estas egala ĉe diversaj legantoj. Ni ne forgesu, ke la nuntempa legantaro ne plu estas homogena kia estis la antikva greka aŭ romia publiko, malgranda tavolo de sklavposedantoj, aŭ kia estis la franca aristokratato en siaj beletraĵoj. Hodiaŭ la legantaro estas tre heterogena kaj la sinteno al la verko diferenciĝas laŭ aĝo, instruiteco, socia tavolo, etikaj, religiaj, politikaj aŭ estetikaj konceptoj, ofte laŭ nacieco aŭ kultura makrosfero. Do ankaŭ la aprecadkriterioj diferenciĝas: la japanajn hajkojn oni ne povas apreci laŭ la samaj kriterioj kiel la francajn, germanajn, italajn poemojn. Tamen, la kriterioj estas ne nur diversaj, ili estas ankaŭ similaj, havas komunajn elementojn specifajn al la beletra ĝenerale. El epistemologia vidpunkto tio diras nenion novan, ĉar la kategorio de fenomenoj, egale kiom diversaj ili estas, havas kaj ĝeneralajn kaj specifajn trajtojn.

Ni rimarku, do, ke la valoroj de la beletraĵo estas kaj spiritaj kaj materiaj kaj informaj, ilin konsistigas kaj lingvaj kaj nelingvaj "signoj", hazardaj kaj nehazardaj, specifaj kaj nespecifaj por la aŭtoro kaj samtempe por la leganto: per siaj spiritaj ecoj la leganto mem "kreas" -parte- la legatan verkon. Konklude, la teorio de la problemoj reliefigas aspektojn multajn kaj diversajn. De tio venas la malfacileco doni al nia demando simplan respondon. Esencas la fakto, ke la valoro de la beletraĵo estas kaj objektiva

- entenanta kvalitojn gravajn por ĉiu sufiĉe instruita leganto - kaj subjektiva, depende de la horizonto de la leganto. Tiu ĉi duobla aspekto de la valoro faras ĝin nemezurebla laŭ la nunaj atingoj de la matematika poetiko.

NOTOJ

(1) La folkloraj mitoj, legendoj, la simplaj kaj emociaj produktoj ĝuis varman apredadon fare de la romantikismaj tendencoj kaj ankoraŭ ĝuas tiun apredadon fare de la nuntempaj tradiciaj orientiĝoj, ĉar tiuj produktaĵoj 'akompanis la historion' de la popoloj, esprimas ties specifecon, animon, pensmanieron, mondkoncepton kaj en siaj fundaj ecoj ili estas 'generalhomaj'. En sia 33a letero rilate al la plej nova literaturo, *Lessing* en 1759 menciis du litovajn 'dojnojn' (t.e. genro kun lirika-epika enhavo, kutime melankolia) kaj laŭdas ilin kiel 'apartajn rarajojn', kiuj lin 'senfine emociis'.

(2) Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1957. Redaktis *William Auld*. Eldonisto: *J. Régulo. La Laguna*, MCMLVIII.

(3) Ne estas ĉi tie loko por repreni la multajn diskutojn pri realismo. Mi prenas la koncepton larĝsence: estas realisma ĉiu ajn verko kies bildoj raportebblas al realo, respektive al la kondutoj de la realo. Do, realismon oni ne identigu kun certa historia orientiĝo. Akcepteblas la tezo ke ĉiuj grandvaloraj verkoj de la pasinteco havas realismajn ecojn.

(4) Fakte la problemoj aperas en ĉiuj metodikaj traktatoj pri la analizo de la beletra verko. Tamen la kriterioj pri la apredado de beletraĵoj estis traktitaj ofte en apartaj studoj, el diversaj vidpunktoj. Rigore elektante teoriajn studojn el la germanaj estetikaj kaj literaturteoriaj, nepre menciendas:

Oskar WALZEL: Das Wortkunstwerk. Mittel seiner Erforschung (La vortarta verko. Eblecoj de ties esplorado), *Leipzig*, 1926.

Leonhard BERINGER: Die literarische Wertung. Ein Spektrum der Kritik (La apredado de la beletra. Spektro de la literatura kritiko) *Halle*, 1938.

Emil ERMATINGER: Das dichterische Kunstwerk. Grundbegriffe der Urteilsbildung in der Literaturgeschichte (La poezia artverko. Bazaj konceptoj de la apredado en la literaturhistorio) *Leipzig-Berlin*, 1921.

Herbert WUTZ: Zur Theorie der Literarischen Wertung. Kritik vorliegender Theorien und Versuch einer Grundregelung (Pri la teorio de la beletra apredado. Kritiko de la ĝisnunaj teorioj kaj pruvo de nova fundamentado). *Tübingen*, 1957.

Fritz LOCKERMANN: Literaturwissenschaft und literarische Wertung (La scienco pri literaturo kaj la apredado de la beletra) *München*, 1965.

La problemojn ankaŭ mi pritraktis jam en mia doktoriĝa disertacio ĉe la *Humboldt-Universitato* de Berlino en 1969: *Die Bewertung des literarischen Kunstwerkes in der rumänischen Literaturkritik der Gegenwart* (La apredado de la beletra artverko en la rumana literaturkritiko nuntempa)

(5) Kritiko de la teorio pri la beletra verko kiel "unikajo" troviĝas en mia verko *Estetica literară* (Estetiko de la beletra), *Timisoara*, 1995, Vol. 1, p. 125-170.

(6) *Sinergio* estas "samceleco de diversaj fortoj aŭ valoroj, rezultanta sintezan efikon sur la fizika aŭ sur la socia kampo" (PIV). *Sinergia efiko* estas specifa al ĉiuj funkcikapablaj sistemoj, ĉar ili estas kompleksaj sistemoj kaj realigas siajn funkciojn pere de la komponantoj. En estetiko tiu teorio solvas longe nesolvitan problemon: kio estas fakte la estetika valoro? La sinergetiko respondas: ĝi estas rezulto de efiko de la komponantoj, t.e. de la temoj, ideoj, problemoj, personoj, komponado, rakontaj solvoj kaj situoj, lingvo, stilo, verso, dialogoj, monologoj, tempaj kaj spacaj dimensioj k.t.p. Sed analizante la efikon de la komponantoj ni devas uzi perspektivojn de la koncernaj sciencoj: lingvistiko, filozofio, sociologio ktp. Ĉu tiuj perspektivoj ne estas "eksterestetikaj"? Ĉuste tie ĉi komenciĝas la konfuzo: *ĉio, kion la verko entenas, efikas estetike - same kiel ĉio, kion entenas teĥnika aparato efikas "teĥnike"* aŭ almenaŭ levas aŭ mallevas la valoron de la tuto.

(7) Heŭristiko (el la Greka *heuriskein* = trovi, malkovri) estas "scienco pri la metodoj de esplorado en la scienco" (PIV).

(8) Interdisciplina perspektivo postulas, ke la esploristo havu plurdisciplinajn konojn kaj tiele la kapablon prijuĝi la fenomenojn samtempe laŭ ĉiuj konataj de li principoj; plurdisciplina perspektivo postulas, ke fakuloj de diversaj disciplinoj studu laŭvice la saman fenomenon. Kompreneble tion povus fari ankaŭ unusola esploristo, se li havas plurajn kvalifikojn.

(9) *Benedetto CROCE* (1866 - 1952) : Eminentita itala kritikisto, literaturhistoriisto, teoriulo kaj politikisto. Li aplikis kaj apogis impresionismajn, pure intuiciajn esplormetodojn en beletra estetiko, neante la analizadon.

Adreso de la aŭtoro:

Prof. Dr. Ignat F. BOCIORT

Bd. Eroilor nr 7/D

RO - 1900 - Timisoara, Rumanio

Priaŭtoro informo:

Profesoro *Bociort* estas plenrajta membro de la Adademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino en la Fakaro 4.2 (Filozofiaj Valoriteorioj) kun la laborkampoj kulturfilozofio, ĝenerala estetiko kaj literaturteorio, kiujn li multajn jarojn instruis en la universitato de *Timisoara* kaj *Bucuresti*, Rumanio.

De 1965 ĝis 1970 li estis Docento pri Rumanistiko en la Universitato *Humboldt* en Berlino, Germanio. De 1978 ĝis 1989 li estis ĉefo de Kolektivo 'Esperanto kaj Interlingvistiko' en la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio.

Prof. *Bociort* estas honora membro de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj ankaŭ de la Esperanto-Asocio de Rumanio.